# *Esperanto en Kubo: 36 jaroj de sen?esa agado*

Esperanto  en Kubo ekis komence de la pasinta jarcento, koincide kun la fondo de Esperanto-asocioj en kelkaj amerikaj landoj. La unua artikolo favora al Esperanto aperis en la revuo *La Rapida Skribo*, organo de la Stenografia Asocio, en aprilo 1904.

Plej meritan laboron rilate la diskonigon de Esperanto nialande faris la elstara intelektulo Dro. Fernando Ortiz, internacie renoma pro siaj studoj sociologiaj, juraj, antropologiaj kaj folkloraj. Li restas ?is nun la plej elstara kuba intelektulo kiu propagandis favore al la solvo de la tutmonda lingva problemo pere de la Internacia Lingvo.

Dum la sekva periodo oni fondis kelkajn asociojn kaj publikigis revuojn, plej parte ili mallonge vivis; la ?efa agado estis dise plenumita de individuoj en diversaj urboj.

La 16-an de junio 1979 oni oficiale fondis la nunan Kuba Esperanto-Asocio, KEA, ali?inta al Universala Esperanto-Asocio en 1983.

La kunordigita kaj konstanta agado de KEA kaj diversaj enlandaj instancoj, ?efe la ministerio de kulturo, ebligis la eldonon de kelkaj titoloj flanke de la Eldonejo en Fremdaj Lingvoj José Martí; inter tiuj titoloj estas *La historio absolvos* min de Fidel Castro; *Kuba ?tata Organizo* de Domingo García Cárdenas kaj kelkaj rakontoj de *La Ora A?o* de José Martí.

Aliaj gravaj atingoj estas la semajnaj radioelsendoj de la internacia radio de Kubo, Radio Habana Cuba, ekde 1988 per mallongaj ondoj, anka? nun interrete kaj enlande per 102.5 FM; en Kubo oni anka? efektivigis internaciajn eventojn kiel la 75-a Universala Kongreso en  1990 kaj denove en 2010 la 95-a UKo; kelkaj festivaloj kulturaj, seminarioj pri apliko de esperanto en scienco kaj tekniko, konferenco internacia de la ligo de instruistoj (ILEI), tutlandaj renkonti?oj kaj kongresoj.

KEA okazigas regulajn kursojn en preska? ?iuj provincoj, distancaj kursoj, elektronikaj kursoj, perkorespondaj kursoj kaj aliaj eventoj kulturklerigaj.

KEA sin preparas por okazigi de la 18ª ?is la 22-a de novembro la 6-a kongreso tutlanda kun partopreno de pli ol cento da kubaj geesperantistoj plus  eksterlandaj kongresanoj; anka? AMO-seminario sesios tuj anta? la kongreso!

La kuba esperantistaro festas hodia? novan datrevenon kun novaj taskoj kaj defioj. Gratulojn al ?iu kuba esperantisto kaj bondezirojn al KEA.

.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/especiales/exclusivas/59325-esperanto-en-kubo-36-jaroj-de-sencesa-agado

**Radio Habana Cuba**